

\*\*\*\*\*

## INSTRU-CIRKULERO 2014/aprilo

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

\*\*\*\*\*

Karaj Gekolegoj,

En la nuna cirkulero mi invitas vin al la sekva jarkunveno de AGEI, alvokas al programoj en 2014, raportas pri eventoj en 2013 kaj mencias aliajn novaĵojn.

I. Laŭ la tradicio ankaŭ la ĉi-jara AGEI-jarĉefkunveno okazos dum la Germana Esperanto-Kongreso (GEK).

### **Einladung: VDEL-AGEI Mitgliederversammlung**

Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer (VDEL-AGEI) lädt zu seiner jährlichen Mitgliederversammlung im Rahmen des 91. Deutschen Esperanto-Kongresses (<http://www.esperanto.de/gea.malnova/gek2014.html>) in Erfurt ein.

Diese findet am Samstag, den 07. Juni 2014 im Kongresshaus: "Haus am Breitstrom", [Evangelia Konsilantara Gimnazio](#) ("Ratsgymnasium"), Meister-Eckehart-Str. 6, D-99084 Erfurt. statt.

Beginn ist um 15:30 Uhr.

Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erwartet daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.


Invito al: Jarĉefkunsido de AGEI

La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn siajn membrojn al la ĉi-jara ĉefkunsido, okazonta enkadre de la 91a Germana Esperanto-Kongreso (<http://www.esperanto.de/gea.malnova/gek2014.html>) en Erfurt inter 06-09 de junio 2014. La AGEI-kunveno okazos inter 15:30-16:45, la 07an de junio, 2014 en la kongresejo "Haus am Breitstrom", [Evangelia Konsilantara Gimnazio](#) ("Ratsgymnasium"), Meister-Eckehart-Str. 6, D-99084 Erfurt. Ni esperas je ĉies aktiva partopreno.

Proponata tagordo:

1. elekto de la gvidanto de la kunsido. Salutado, malfermo. Elekto de protokolanto, kontrolo de laŭstatuta invito kaj decidpovo
2. decido pri la tagordo
3. raportoj de la kasisto kaj la kasrevizoroj
4. raporto de la estraro. Malŝarĝigo de la estraro
5. elekto de la estraro
6. pluaj aktivecoj kaj proponoj
7. laborplano por la sekva agadjaro. Decido pri loko kaj dato de sekva jarĉefkunveno.
8. diversajtoj

Koran bonvenon!



Zsófia Kóródy  
AGEI-Vorsitzende  
AGEI-prezidanto

## II. Interesaj kaj gravaj klerigprogramoj en Germanio en 2014

**1. SOMERA KURSARO:** Se vi volas lerni la lingvon en intensa kurso, perfektigi vian Esperanton kaj/aŭ interesiĝas pri instruado, metodiko, didaktiko, pripensas fariĝi klubgvidanto, Esperanto-instruanto aŭ jam instruas kaj volas lerni novaĵojn, fariĝi pli bona, pli sperta, nepre vi partoprenu en somero en la kursaro de Interkultura Centro Herzberg. Jen detaloj:

SEP - Semajnoj de Esperanto-Perfektigo: 2x1 semajna intensa lingvokurso en diversaj niveloj kaj instrukapabla, metodika trejnado inter 19-26 julio kaj 27 julio - 03 aŭgusto 2014.

Kurshoroj antaŭtagmeze kun spertaj instruistoj, posttagmeze, vespere ekzercado, praktika uzado de Esperanto, studado en la biblioteko, komunaj programoj, kantado, muziko, filmoj, ĝardena rostadfestoj, ekskursoj en la regiono.

Kurskotizo (inkluzive lernmaterialo, dumtagaj programeroj): 100 EUR por 1 semajno, 160 EUR por 2 semajnoj.

Tranoktado: laŭ via prefero ni povas oferti komfortajn dupersonajn ĉambrojn (kun komuna banĉambro en la loĝejo) por 12 EUR/nokto; liti por vi ferioĝejon en Herzberg por ĉ. 20 EUR/persono, se estas min. 2 personoj kune; aŭ rezervi hotelĉambrojn por ĉ. 35-45 EUR en tri resp. 4-stela hotelo. Ankaŭ memzorgantoj, tendumantoj estas bonvenaj!

Aliĝu ĉe <http://ic-herzberg.de/reg.php> kaj petu subvencion de AGEI/ILEI por via partopreno!

## 2. STUDESIOJ

Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, klerigejo de GEA ankaŭ en 2014 regule ofertas siajn klerigmodulojn por perfektigemoj, movadaj aktivuloj, interesiĝantoj pri kursgvidado, instruado de Esperanto. La tutjara programkalendaro estas trovebla (ofte kun aldonaj detaloj) ĉe <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=92783725>

La datoj en 2014 estas la sekvaj:

- majo 29-junio 01 64a Studsesio: muziko, kulturo
- julio 19-aŭgusto 03 Semajnoj de Esperanto-Perfektigo (SEP)  
Intensa lingvokurso en diversaj niveloj kaj instrukapabla, metodika trejnado (65a Studsesio)
- oktobro 02-05 TORPEDO 9: Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia: spertinterŝanĝo, faka konsultiĝo, internaciaj projektoj. 66a Studsesio  
(oktobro 4: Internacia festivalo de Esperanto-filmoj)
- decembro 12-14 67a Studsesio: klerigmodulo pri literaturo, movadhistorio  
(decembro 13: Tradicia Zamenhof-festo kun vespera kulturprogramo)
- decembro 28-januario 02 2015: SANO-5 Alternativa jarŝanĝa seminario: Sano - Alternativo - Novjaro

Post ĉiu sesio la partoprenantoj ricevas atestilon, kreditpoentojn.

Pluaj informoj ĉe <http://ic-herzberg.de/page.php?pid=81093452> aŭ de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

### III. KONFERENCOJ

1. **La 46a ILEI-konferenco** en 2013 sukcese okazis en Herzberg/Sieber. Per tio AGEI finis specialan jaron kaj povas ĝoji pri laŭdoj pro la organiza laboro, alta faka nivelo de prelegoj kaj seminarioj, interesaj ekskursoj kaj abundaj kulturaj programeroj. La konferenco havis iom da financa gajno por ILEI kaj laŭ la kontrakto ankaŭ por AGEI.

2. **La 47-a ILEI-konferenco** okazos en Montevideo, Urugvajo, inter 19-a kaj 25-a de julio 2014. La Ministerio pri Kulturo kaj Edukado de Urugvajo deklaris la 47-an Konferencon de ILEI kiel eventon de kultura signifo. Ĝi okazos en la semajno antaŭ UK en Bonaero omaĝe al la 60-jariĝo de la unua Rezolucio de Unesko pri Esperanto (Montevideo, 1954).

La faka laboro de la konferenco ĉi-foje enfokusigos latinamerikajn spertojn kaj tendencojn sur la tereno de lingva ekologio sub la lumo de la 60-jara rezolucio de Unesko pri Esperanto. Pri ĉi tio aparte okupiĝos la tradicia simpozio pri la konferenca temo, inkluziva por ambaŭ – esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj. Ĉi-foje ILEI organizos la simpozion kunlabore kun ISAE kun espero daŭrigi la kunlaboron en postaj jaroj kaj disvastigi ĝin sur diversajn kunlaborkampojn. Ne mankos la tradiciaj kulturaj, distraj kaj turismaj programeroj: interkona frandvespero, nacia, internacia, adiaŭa vesperoj, bankedo, lingva festivalo, ekskursoj. Aliaj programaj, kulturdistraj kaj turismaj celoj, enhavoj kaj logaĵoj kune kun aliĝkondiĉoj kaj loĝofertoj, estos prezentitaj per konferencaj komunikoj kaj tra aliaj komunikkanaloj. Ĉiujn bezonatajn informojn kaj la aliĝilon oni trovas sur la hejmpaĝo de ILEI <http://ilei.info> kun detaloj pri la aliĝkondiĉoj.

3. **La 48-a ILEI konferenco** en 2015 okazos en Oostende, Belgio, tuj antaŭ UK en Lille, Francio.

4. **3-a Tutmonda Kolokvo:** 13a ĝis 16a de majo 2015. Mireille Grosjean, ILEI-prezidanto anoncas: Invito iros de ŝtato al ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Ĉar en Svislando niaj kantonoj estas ŝtatoj, mi iris al la kantona registaro de Neuchâtel kaj petis, ke la kantono invitu. Kaj la registaro konsentis per decido je la 20a de novembro 2013. En la kantono Neuchâtel troviĝas la ĉefurbo Neuchâtel kaj la urbo La Chaux-de-Fonds, kie troviĝas CDELI, grava arkivejo pri planlingvoj. En tiuj du urboj okazos la Kolokvo. La kantona registaro ofertas la luon de la universitata aŭlo kaj la ĉambroj en la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds estas formale rezervita.

La unua tia Konferenco okazis en Ĝenevo en 1922, la dua en Prago en 1927. Estos la tria.

La registaro de la kantono do konsentas inviti ĉiujn registarojn de la mondo sendi delegacion al tiu kolokvo. Tio signifas, ke en ĉiu ŝtato de la mondo venos al la registaro la invitletero (en marto-aprilo 2014). Do la registaro devos esplori, informiĝi, ĉu Esperanto estas instruata sur ĝia teritorio. Tio estas la pozitiva afero en tiu kolokvo, fakte eble pli ol la konferenco mem.

#### Celoj

- Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por lerni.
- Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por instrui.
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto (lernhelpa efiko)
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto (en la kampoj de psikologio, akiro de interkulturaj kapabloj, solidareco, toleremo)
- Interŝanĝo de spertoj
- Renkontiĝo kun lokaj fakuloj

### IV. AGNOSKO, PROJEKTOJ

1. **LEB:** Kun ĝojo ni informas, ke la kleriglaboro de la GEA-klerigejo (Interkultura Centro Herzberg, sidejo ankaŭ de AGEI) ricevis ŝtatan agnoskon. La anoncitaj Esperanto-kursoj kaj la

germanlingvaj prelegoj, klerigofertoj enkadre de la t.n. Interkulturaj Vesperoj ricevis agnoskon de LEB (Ländliche Erwachsenenbildung, regiona sidejo en Göttingen).

La tutjara programo (vidu aldone) enhavas multajn interesajn prelegojn, prezentadojn kaj informoj aperos pri ili ankaŭ per la kanaloj de LEB <http://leb.de/> kaj eblos ankaŭ ricevi de ili etan laŭhoran financan subvencion.

## 2. ERASMUS+

En 2013 finiĝis la ĝisnuna eŭropa subvenciado enkadre de la Dumviva Lernado Programo. Anstataŭ ĝi aperis nova programo sub la nomo Erasmus+. Trastudinte la kondiĉojn kaj subvencieblojn, la Esperanto-Centro en Herzberg ellaboris projektplanon por la periodo 2014-2015 por serio de studsesioj kaj trejnkursoj por instruistoj, instruantoj kaj aktivuloj nunaj aŭ venontaj. Pri la novaj subvenciebloj, kiuj anstataŭigas ekz. la ĝisnunajn Comenius kaj Grundtvig projektojn, ni planas oferti specialan informadon, klerigadon dum TORPEDO-9 (2-5 oktobro, 2014) en Herzberg.

## 3. COMENIUS

En Germanio en somero 2014 finiĝos du internaciaj Comenius-projektoj kun eŭropa subvencio por lerneja partnereco: unu en Winterberg (sub gvido de Christof Krick) kaj la alia en Herzberg am Harz (gvidata de Zsófia Kóródy kaj Ewa Kukielka). En la sekvaj tagoj, inter 23-29 aprilo en Herzberg am Harz okazos la lasta kunveno de la Esperanto-rondo de E-M-A Gimnazio kun siaj mezlernejaj partneroj el Győr, Hungario kaj Mazara del Vallo, Italio. La membroj de la partnerlandaj delegacioj unu semajnon pasigos en la Esperanto-urbo kaj ellaboros komunajn materialojn por klerigado de junaj ĉiĉeronoj.

## 4. GRUNDTVIG

La eŭropa programo Grundtvig servas la pluklerigadon de plenkreskuloj. En la jaroj 2011-2013 GEA partoprenis en internacia partnerprogramo, en 2013-2015 Germana Esperanto-Centro realigas sian projekton kun partneroj el Pollando, Nederlando kaj Hungario. La titolo de la projekto estas: Kultúra diverseco – kiel ni lernu pri tio? La unua partnera renkontiĝo okazis en januaro 2014 en Pollando, la dua estos en majo en Nederlando.

## V. EKZAMENOJ

1. Post la sukcesoj de la Unua kaj Dua Tutmondaj Ekzamentagoj la komisiono de UEA pri la Ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) decidis aranĝi similan tagon ankaŭ ĉi-jare. La dato de la 3-a Tutmonda Ekzamentago estas la 17-a de majo 2014.

### 2. KER-ekzamenoj dum GEK en Erfurt

Eluzu la ekzameneblon kaj akiru internacian KER-diplomon pri viaj Esperanto-lingvokapabloj. Vi povas elekti skriban, parolan kaj kompleksan ekzamenon (skriban kaj parolan partojn kune). Ne pre aliĝu jam nun, laŭeble ĝis majo ĉe <http://www.edukado.net/alighilo?id=2014DE-ERFU> indikante la elektatan nivelon. La dato de la skriba ekzameno: 06.06.2014 inter 17:00-20:00 en la kongresejo Kongresejo: "Haus am Breitstrom", Evangelia Konsilantara Gimnazio ("Ratsgymnasium"), Meister-Eckehart-Str. 6, D-99084 Erfurt.